

ESPERANTO PROVENCE

Numero 94 - Aŭtuno 2013
www.esperanto-provence.org

4 numeroj/jare
www.facebook.com/esperantoprovence

redaktoro:
Pascal Vilain

p.vilain83@orange.fr
61 montée du Castelar
83460 TARADEAU
04 94 73 33 24

kasisto:

Michel Cerisay
mcerisay@gmail.com
15 Place des Vents Provençaux
13140 MIRAMAS

baza kotizo al la Federacio (kun bulteno): 6 eŭroj

Vorto de la Prezidanto

Denove finiĝis la ferioj, kaj mi esperas, ke vi pasigis agrablan, « varman someron ».

Sendube vi travivis kelkajn renkontiĝojn en Esperantujo. Tiuj interŝanĝoj ĉiam estas stampitaj per ĝojo kaj riĉeco !

Al vi, kiuj partoprenis en diversaj staĝoj por lerni aŭ plibonigi vian nivelon, mi esperas ke vi spertis multe da progresoj.

La lerneja jaro nun rekomenciĝas.

Ni preskaŭ ĉiuj partoprenos en « Foiroj de asocioj » ; ni devus profiti la okazon por instigi novajn personojn partopreni en niaj kursoj kaj pligrandigi nian familion. Tio nepras por Esperanto-P.A.C.A.

Do, ek al la laboro !

Pierre Oliva

Kongresa sezono – Universala Kongreso en Islando

Kelkaj Provencanoj partoprenis en iuj el la pluraj kongresoj proponitaj al la esperantistaro dum la somero.

Jen iliaj priaj raportoj kaj fotoj.

Estas nekutima sperto partopreni SEKRETAN Universalan Kongreson !

En la Islanda urbo Rejkjaviko, videblis nek banderolo, nek standardo, nek flago dum la kongreso. Stranga afero, precipe kiam oni memoras, kiel aspektis Hanojo lastan jaron.

ranta flago meze de la standardoj de *Harpa*. Ene de *Harpa* aperis nur ega Esperanta flago sen klarigo, do se vi ne konas ĝin vi povas opinii, ke ĝi estas nur dekoracio por iom kolorigi la malhelgrizajn murojn.

Harpa estas tre vasta, do la kongreso uzis nur parton de ĝi. Komence de la koridoroj kondukantaj al ni estis afiŝoj, kiuj tekstis : *Private meeting / do not enter / badge holders only* (privata kunveno / ne eniru / nur por montrantoj de ŝildo) kaj nur post la tria tago, la teksto "*private meeting*" iĝis « 98a Esperanto-kongreso ».

En la kongresloko, ĉio okazis laŭkutime. Mova da foiro tre populara kun multege da budoj kaj partoprenantoj. Pro programo tiel plena, oni malfacile elektas, kiun prelegon sekvi, kiun ekskurson partopreni (ĉu al glaciejoj, ĉu al gejseroj, ĉu al maro por vidi balenojn, ĉu piede tra la urbo...), kiun muzikaĵon, teatraĵon, filmon ĉeesti, ktp.

La prelegoj de la universitato estis tre interesaj, ekz. pri la violono, pri islandaĵoj (oni eĉ klarigis, kial kaj kiel okazas aŭroroj kaj « *borealis* » kaj « *australis* »), pri romia imperio ktp.

Do, finfine, tre kontentiga kongreso por tiuj, kiuj antaŭsciis pri ĝi.

raportis Jean-Claude Roget

En la kategorio Prozo de la Belartaj Konkursoj, *Ewa Grochowska* – el la Rodanalpa Federacio - ricevis la duan premion pro "Parentezo" kaj Humphrey Tonkin transdonis al ŝi la diplomon. (M.A.)



Malfermo de la UK

Eĉ la antaŭan semajnon, en la turisma oficejo, oni ne sciis pri la UK kaj ne estis koncernita. Tamen oni diris, ke okazis televidelsendo kaj gazetraportoj pri la UK.

Sur la fasado de la kongresejo (kies nomo estas *Harpa*) ne aperis banderolo pri la UK, eĉ ne dum la tuta semajno. Nur ekde la dua tago flirtis eta Espe-

Kongresa sezono – Itala Kongreso en Kastelaro

Ĉu vi ŝatus partopreni en evento, kiu similas al Universala Kongreso, ne tro for de Francio, kun ne tro multe da homoj ? Se jes, la propono estas : aliĝu al la itala kongreso !

Jam plurfoje mi partoprenis en ĝi en diversaj lokoj, Pizo, Torino, *Linjano*, *Mazara del Vallo* kaj lastatempe en *Kastelaro* apud San-Remo. Al la 80a Itala Kongreso de Esperanto, de la 3a ĝis la 10a de Aŭgusto 2013, aliĝis 250 homoj ; el ili 215 partoprenis, venante el 34 landoj ; esperantistoj el Angolo kaj Demokratia Respubliko Kongone ricevis vizon ; dekvindeko da francoj vojaĝis al *Kastelaro*. Bunta programo : okazis seminarioj, kursoj, prelegoj, spektakloj kies respondeculoj venis el Anglio, Rumanio, Rusio, Usono, Hispanio, Francio, Italio, Germanio, Nederlando, Serbio kaj Pollando.



La urbestro de la Sicilia urbo Mazara del Vallo estis honorigita de la Itala Federacio de Esperanto kaj antaŭ foriro, li donacis al mi keramikaĵon memfaritan.

La ĉi-jara temo estis « Sin kompreni por sin respekti ». *Humphrey Tonkin* inaŭguris tiun kongreson per tre interesa festparolado : « Esperanto, ponto por la Eŭropa kulturo ». (Ĝi estos publikita poste). *Paul Gubbins* el Anglio gvidis seminarion « Eŭropa kulturo tra Esperanto » ; pro diverseco de la elektitaj tekstoj kaj la bunteco de partoprenintoj, ĝi estis

tre interesa. *Maria Nuyanzina* gvidis seminarion kies titolo estis « Historio, teorio kaj praktiko de tradukado » kaj *Katalin Kovats*, kun la asisto de *Sylvain Le-Large*, proponis seminarion pri « Metodika trejnkurso pri lingvoinstruado ». *Humphrey Tonkin*, kiu fakas pri Ŝekspiro, prelegis pri “*William Shakespeare moralisto*” kaj “la homo *Shakespeare* kaj la varo *Shakespeare*”. *Davide Astori* proponis : “Noktaj meditadoj : Esperantujo inter Eŭropaj lingvaj kaj religiaj minoritatoj” por la noktemuloj kaj *Kimie Markarian* iniciatis homojn al Sorobano. Teatraĵo “Galileo” estis prezentita de *Saša Pilipoviĉ*, kiu poste ludis kun *Georgo Handzlik*. *Christoph Frank* prezentis puĉteatraĵon. *Ho Song* ekspoziciis pentraĵojn en la salono Zamenhof. Koncertoj okazis sur la placo de la vilaĝo, tie kantis Kimo - *Kim J. Henriksen*, kaj li kantigis la homojn ; alia etoso estis kun la koncerto de *Guillaume Armide*, de *Manüel Revere*, kaj la lastan vesperon la grupo Kapriol’ regalas la vilaĝanojn kaj la esperantistojn. Pli intima kaj samtempe mirinda estis la koncerto de *Maria Grazia Barboni*, ne esperantista, kiu kantis esperantotradukojn de la kanzonoj de *Fabrizio de André*, kaj franclingve *Edith Piaf* kaj aliajn kanzonojn akompanante sin per gitaro. .

Diversaj ekskursoj estis proponitaj al Francio, al Montekarlo kaj al diversaj lokaj italaj urboj, inter ili Ĝenovo. Indas menciigi la kulturalan ekskurson kun kunveneto en *Bordighera* (muzeo *Bicknell*), *Casterino* (*Fontanalba*, hejmo de *Clarence Bicknell*) kaj *Tende* (*Musée des Merveilles*).

Kiel kutime kiam estas tiel riĉa programo proponita, oni devas elekti, kaj ni ne forgesu la naĝejon tute proksiman kaj allogan !

En 2014, de la 23a ĝis la 30a de Aŭgusto, la 81a kongreso okazos en montara regiono, en *Fai della Paganelle (TN)*, kun la temo : « Esperanto kaj novaj teknologioj ». Pripensu pri tio...

raportis Monique Arnaud

Kongresa sezono – ILEI-Konferenco

Inter la 12a kaj 18a de Julio 2013 okazis en la germana vilaĝo *Sieber*, 7 km for de *Herzberg-am-Harz* (la Esperanto-urbo) la 46a ILEI-konferenco. Al ĝi aliĝis 104 personoj, inkluzive la junulojn en la paralele organizata Somera Arbara Lernejo (SALO 8). Antaŭ la malfermo, alvenintoj per komuna ekskurso konatiĝis kun *Herzberg* - la Esperanto-urbo – kaj kun la Eo-muzeo en ĝia kastelo, kaj montris sin pere de

koncerto en la urbocentro.

La evento estis bonege organizita en tiu belega montara regiono : buseto de la fajrobrigadistoj atendis la partoprenantojn ĉe la stacidomo kaj veturis ilin ir-kaj-reen ! La posedantoj de la Hotelo “*Zum Pass*” parolis Esperante. Ni povas varme danki la lokanojn, ĉefe *Zsofia-n Korody* kaj ŝian edzon.

Kun la temo « Instruado de Esperanto al ĉiuj ge-

neracioj », la konferenco estis inaŭgurita en la 13a de Julio. La urbestro de *Herzberg*, s-ro *Gerhard Walter*, partoprenis la malfermon en *Herzberg-Sieber* kaj salutis ĝin en Esperanto, citante pri la konferenca temo la proverbon : « kiu haltas, tiu rustiĝas ». Li persone emfazis tion per la aldono : « kaj tiu, kiu ĉesas lerni, rustiĝas ankoraŭ pli rapide. » Salutis la konferencon ankaŭ s-ro *Ahlborn*, la estro de la vilaĝo *Sieber*, kie okazis la konferenco. Partoprenis al tiu konferenco 4 francoj.

La konferenca programo konsistis el prelegoj, prezentoj, kursoj, seminarioj, diskutrondoj kaj kunsidoj de diversaj agadgrupoj. La prelego de *HUANG Yinbao* (Trezo), kies titolo estis : « Angla lingvo perfortas ĉinajn lernantojn » estis tre interesa kaj ni planas aperi ĝin.

Seminarion gvidis *Sabine Trenner*, pri la temo « Vojoj el konfliktoj – mediado ». Ses-partan metodikan seminarion gvidis dr-ino *Katalin Kovats*.

La komitato de ILEi havis ĉiun tagon kunsidon dum kiuj okazis raportadoj, decidoj, planado de la sekvaj jaroj.

La 15an de Julio, matene, la ĝisnuna estraro de ILEI estis senŝarĝita kaj okazis elekto de nova ILEI-prezidanto. En tiu voĉdonado **Mireille Grosjean** el

Svislando estis elektita kiel nova prezidantino de la ligo.



partoprenantoj en la ILEI-konferenco

Samtage, t.e. la 15an de Julio okazis ankaŭ **KER-sesio**, al kiu - post preparado kaj varbado - aliĝis 10 personoj inter ili unu el Makedonio.

La Komitato aprobis la elekton de du Honoraj Membroj, nome Doktorino *Katalin Kovats*, redaktoro de la porinstruista paĝaro www.edukado.net, aŭtorino de diversaj faklibroj kaj

lertigisto de ĝeinstruistoj, kaj Sinjoro *Stefan MacGill*, kiu prezidis la ligon dum preskaŭ kvar jaroj, faris por ILEI elstarajn laborojn, verkis lernolibrojn, redaktas la revuon "Juna Amiko" kaj ankaŭ multe pli.

Nova sekcio de Sud-Afriko estis akceptita, do nuntempe ILEI havas 35 sekciojn. Venonta ILEI Konferenco okazos en Montevideo (Urugvajo) en Julio 2014.



partoprenantoj de SALO kun Monique unuavice

*Finiĝis do la kongresoj de la somero 2013, jam estas tempo por pensi pri la venontaj jaroj.
Vi ne povas ne scii pri la UK, kiu okazos en Lille en la somero 2015. Jen informoj – kaj peto al ĉiuj vi
- pri tiu grava evento.*

Lille 2015 Sondage pour le congrès mondial d'espéranto

Saluton !

Le congrès mondial d'espéranto (Universala Kongreso, UK) aura lieu à Lille du 25 juillet au 1er août 2015.

Voici le site internet qui lui est dédié :
www.lille2015.fr (en espéranto et en français)



Espéranto-France, sous la direction de l'Association mondiale d'espéranto, est l'organisateur de ce congrès et nous allons bien évidemment avoir besoin d'aide. L'aide peut venir de tout côté et chaque coup de main sera le bienvenu. Afin de commencer à constituer des équipes et d'anticiper sur les personnes que nous pourrions contacter en cas de besoin, nous vous invitons à remplir dès à présent un petit questionnaire qui n'engage à rien mais qui permettra de nous situer et de contacter les personnes en temps voulu.

Dankon !!

L'équipe de Lille 2015 Espéranto-France

lien pour le questionnaire :

https://docs.google.com/forms/d/1LISrN2SYViKpJvJ-QaCa_mE-6LqHFNtoNqHxOpABYjg/viewform

-0-

En Le Beausset, Eo ne ferias !

Vizitintoj en *Le Beausset*, fine de Julio

Nicole kaj mi hejme gastigis *Jozefo-n* kaj *Maria-n Trnka* el Hungario.



niaj gastoj kun samideanoj

Agrabla programo : promenadoj kaj gaja pikniko kun pluraj samideanoj ; kiel ĉiam, tre animaj interparoladoj pri la vivo ĝenerale, pri Eŭropo kaj utileco de Pasporta Servo.

Efemera Eo-leterkesto en *Le Beausset*

Komiciita de la turismoficejo, S-ino *Robin*, urba konsilanto, petis de nia Eo-Asocio, ke ĝi konstruu fantazian leterkeston, kadre de tuturba evento.

Ni jesis al tiu demando kaj fabrikis leterkeston, kiu estis ekspoziciita en butikoj de nia urbeto dum Julio kaj Aŭgusto. Tre bela reklamo por nia asocio, ĉu ne ? Ni esperas, ke ĝi naskos multe da demandoj pri nia lingvo. Tion ni scios en Septembro.



afiŝo pri la evento...



kaj nia leterkesteto

pri ambaŭ informoj : Pierre Oliva

Depuis peu, Espéranto-France (UFE dans le tableau) propose aux associations volontaires un nouveau système de cotisation. Pour permettre aux différents clubs de Provence de s'en faire une idée, voici une simulation à titre d'exemple.

Pour plus de renseignements, veuillez vous adresser à Espéranto-France.

www.esperanto-france.org

Espéranto-France – 4bis rue de la Cerisaie – 75004 Paris

Cotisation inter-associative

simulation pour le club « Espéranto Fréjus – Saint-Raphaël »
(base : 20 adhérents dont 4 adhérent à UFE)

<u>situation actuelle</u>	<u>proposition</u>
club local : 14 € fédération : 6 € UFE : 39 €	club local : 14 € fédération : 6 € UFE : 20 €
1) avec adhésion UFE (4 adhérents)	chaque membre devient adhérent d'UFE (la cotisation globale est versée à UFE, qui ventile par la suite au club et à la fédération)
total : $14 + 6 + 39 = 59$	total : $14 + 6 + 20 = 40$
réduction d'impôts : 66 % de 39 = 25,74 reste : 13,26	réduction d'impôts : 66 % de 40 = 26,40 reste : 13,60
$14 + 6 + 13,26 = 33,26$	somme effectivement payée : 13,60 €
somme effectivement payée : 33,26 €	gains à chaque niveau :
2) sans adhésion UFE (16 adhérents)	pour le club : $14 \times 20 = 280 \text{ €}$ pour la fédé : $6 \times 20 = 120 \text{ €}$ pour UFE : $20 \times 20 = 400 \text{ €}$
somme effectivement payée : $14 + 6 = 20 \text{ €}$	(Les personnes non imposables paient la moitié de la cotisation.)
pas de réduction d'impôts	(de plus, l'abonnement annuel au Monde de l'espé- ranto est proposé à 8€ au lieu de 18 €)
3) gains à chaque niveau	
pour le club : $14 \times 20 = 280 \text{ €}$ pour la fédé : $6 \times 20 = 120 \text{ €}$ pour UFE : $39 \times 4 = 156 \text{ €}$	

Diversaj novaĵoj

Ĉi tiu rubriko estis preta por la antaŭa bulteno somera, sed ne aperis pro teknikaj kialoj. Mi pardonpetas al la personoj, kiuj sendis artikolojn antaŭ la junia limdato kaj esperas, ke la prokrasto ne estis tro ĝena.

la red.

Ker-ekzameno

En Greziljono, de la 19a ĝis la 26a de Aprilo, okazis staĝo sekvita la sabaton 27an kaj dimanĉon 28an de KER-ekzamenoj B1, B2 kaj C1.

Michel Cerisay staĝis kaj sukcese trapasis la kompleksan ekzamenon je nivelo B2. Gratulojn al li !

Pétition présentée aux Issambres par Thierry Saladin

(voir l'article du n° 93 – rubrique Esperanto-Klubo Fréjus - Saint-Raphaël)

Depuis le début du mois de février 2013, une pétition lancée sur Internet recueille des signatures. Oui, sans faire de bruit, jour après jour et dans le monde entier, des personnes issues aujourd'hui de plus de 104 pays ont approuvé cet appel lancé par Joannès de Divonne, l'auteur de cette pétition : « **L'Espéranto, langue officielle de l'Union européenne, maintenant !** »

« **Nous, citoyens européens et du monde, nous vous appelons à faire de l'espéranto la 24ème langue de l'Union Européenne, pour une Europe plus démocratique et plus équitable vis-à-vis de chaque langue et culture du continent. Choisir l'es-**

péranto, c'est un pas de plus dans la construction européenne. Il manque un débat au niveau européen, l'Europe ne doit pas seulement être économique, elle doit aussi être l'Europe des peuples. »

extraits des sites tuj.free.fr et avaaz.org

Cette pétition se trouve à l'adresse suivante :

http://www.avaaz.org/fr/petition/Esperanto_langue_officielle_de_lUE/

et pour en savoir plus, le site officiel :

<http://tuj.free.fr/>

Roman de Trevor Steele traduit en français

Grâce à une équipe de traducteurs dirigée par Ginette Martin, le roman de Trevor Steele : « Flug kun kakatuoj » (éditions Kava-Pech 2010) existe maintenant en version française, « Comme un vol d'oiseaux sacrés », éditée par la même maison d'édition tchèque. L'éditeur, Petro Chrldé, est venu en personne apporter en France les premiers exemplaires. (voir article dans le n° 93 de Espéranto-Provence, dans la rubrique « Le Beausset »).

résumé du roman :

Au nord de l'Australie Occidentale, Canterbury Downs est un vaste et beau domaine pour les colons anglais qui en sont « légalement » propriétaires. En cette fin du dix-neuvième siècle, le jeune idéaliste Billy Dixon, très fier de sa bonne éducation britannique, sûr d'appartenir à la classe supérieure de la société, est heureux d'y travailler comme gardien des immenses troupeaux, « cow-boy » dirait-on sur un autre continent, après avoir abandonné l'idée de s'enrichir en devenant chercheur d'or. L'expérience avait été trop dure.

Mais autour s'étend un paradis, qui s'appelle Ulgangulura pour les Banubi, dont les ancêtres ont vécu sur ces terres depuis des temps immémoriaux. Elmanu, leur chef, essaie avec les siens de chasser les Blancs. Les lances s'opposent aux fusils, la connaissance de la nature permet de ruser contre les cavaliers. La lutte est inégale. Le jeune Jangabara, chassé par les siens pour n'avoir pas respecté les totems, vient travailler sur le domaine. Il apprend



les spécialités des Blancs : monter à cheval, utiliser un fusil, parler anglais. Billy se lie d'amitié avec lui.

D'un côté, le monde des policiers, dont certains ont le vieux titre de constables, et celui des éleveurs, de l'autre, celui des « nègres », tellement en harmonie avec la nature, les falaises, les grottes. Les catoès, symboles de pureté, de noblesse, attirent irrésistiblement Jangabara, si élané, si sportif, qui finira par les rejoindre.



*okaze de kunsido de la federaciaj estraranoj,
prezento de la romano de T.Steele
en la franca kaj esperanta (maldekstre) versioj.*

Trevor Steele a écrit là un superbe roman sur son pays, et nous suivons les pensées et les actes, tantôt des Blancs, tantôt de ceux qui aiment vraiment cette terre pour elle-même.

Nova kompaktdisko de Manŭel

En la granda, tutmonda familio de la Esperanto-parolantoj, miaj du jam eldonitaj kompaktdiskoj de kantoj en Esperanto - "Duonvoĉe... tutkore" kaj "Ĉu plu ekzistas Amo?" - ricevis multajn, pozitivajn recenzojn de la esperantista gazetaro kaj, kio eble pli gravas, la aprobon de la publiko, okaze de miaj recitaloj en pluraj eŭropaj landoj.

Radio-elsendoj kaj podkastoĵoj ofte proponas kantojn el tiuj albumoj, kiuj fariĝis famekonataj de la plimulto el la ŝatantoj de kantoj en la Lingvo Internacia.

Tio instigis min prilabori ĉi-tiun novan kompaktdiskon, kun la espero, ke mi ankoraŭ kapablos transdoni mian amon por la muziko kaj por Esperanto pere de agrablaj kantoj, en korekta, bone prononcata lingvo. Temas pri "popularaj kantoj", tial ĝiaj tekstoj estas simplaj, kvankam ne banalaj, kaj uzas la normalan esprimmanieron de la plimulto el ni por paroli pri Amo, amikeco, paco kaj respekto de nia komuna hejmo, "la planedo Tero".

La albumo titoliĝas "Mirindaĵo" ĝuste ĉar nia planedo tero kaj la vivo estas mirindaĵoj.

La kompaktdisko entenas, aldone al la dek kantoj, ankaŭ la muzikajn bazojn sinkronigitajn kun la videotekstoj (DDD). Ĝi mendeblas ĉe la Libroservoj de UEA, de IEF, ktp kaj precipe ĉe:

www.vinilkosmo.com.

informis Manŭel

Nepras aldoni, ke por tiu nova disko estis surbendigita la kanzono « La fremdulo », en nova traduko de la fama « Le Métèque », de Georges Moustaki, kiun ni ŝuldas al Michel Dereyger, esperantisto el la Lille-a regiono, kiu eble baldaŭ loĝos en Fréjus. Gratulojn al li !...

Stage d'espéranto avec les Amis de la Nature

Stage d'espéranto à Lou Be Co, dans le chalet des Amis de la Nature de Besançon, organisé conjointement par les Amis de la Nature de Besançon et l'association Besançon-Espéranto.

25 octobre (soir) au 28 octobre (matin)

But : donner aux débutants les premières bases de l'espéranto, permettre à ceux qui ont déjà commencé l'apprentissage d'oser parler, et pour les autres, se perfectionner dans une traduction ou une pièce de théâtre.

Sur le chemin du retour, possibilité de visiter le musée espéranto à Gray dans la Haute-Saône.

- ➔ participation aux frais : 10 €
- ➔ repas du vendredi soir au lundi matin : 50 €
- ➔ nuitée : 7 € pour les Amis de la Nature, 13 € pour les non-adhérents

pour infos : jacqueline.poux@laposte.net

ou : Amis de la Nature - Centre Simone de Beauvoir
F.O.L. – 14 rue Violet – 25000 Besançon

*informis Bernard Greck, ano de la Manosque-a grupo
kiu partoprenos en la staĝo.*

« Il suffit de passer le pont » en Esperantan traduko



Ĝus aperis la libro « Manifesto por nova civilizado » ĉe « Eldona Fako Kooperativa de SAT » en traduko far Renée Triolle el la libro eldonita en 2012 ĉe Edilivre : « Il suffit de passer le pont » (Ŝufiĉas trairi la ponton).

Se vi havas 3 €, aĉetu kaj eble legu.

Kial ni ne legu ĝin ?

Unue ĉar la du aŭtoroj estas danĝeraj anarkiistoj. Ili malestimas la anglomaniulojn, elflatojn de potenculoj. Ili denuncas la malmoralcon de la sennacieca Financaro. Ili propagandas la rajton de ĉiu homo decidi pri sia korpo, sekso. Ili aplaŭdas la "Femen-ojn". Ili ostracisas tiun Progreson ignorante la Homojn.



Patrick Pappola kaj Michel Eliard, la aŭtoroj,
kun Renée Triolle, la tradukinto

Kial ni legu ĝin ?

Komence, unu humura rakonto el « Snarkĉaso » de Lewis Carroll :

La kapitano de ekforiranta ŝipo kiu, koncerne la navigadon, ne scias ion alian ol soni ĝian sonorilon, montris al maristoj sian mapon tute blankan, kaj ĉiuj diris, finfine estas mapo, kiun ĉiuj bone komprenas.

« Esperanto-TV-&radio »

Ĉu vi konas la TTT-ejon "Esperanto TV & radio"? Ĝi estas TTT-ejo, kiu listigas la TV-kaj-radio-programojn en Esperanto dissendatajn nuntempe. Provu : <http://esperanto-radio.com/>

informis Aloísio Sartorato Rio, Brazilo

Pro manko de loko, ne eblas aperigi ĉiĵojn novajn datojn pri Eo-aranĝoj.

Bonvolu konsulti la agendon de la Julia bulteno n°93, precipe por la diversaj Asociaj Forumoj en Septembro kaj la intensiva staĝo en La Ciotat en Oktobro.

Samkiale, ne eblas enmeti la rubrikon « La federaciaĵoj esprimas sin... », kiun vi espereble retrovos en la januara bulteno n° 95.

Limdato por sendo de publikotaĵoj por la venonta numero :

20a de Decembro 2013

Bonvolu sendi al : p.vilain83@orange.fr

Antaŭdankojn pro viaj kontribuoj

Esperanto Provence 8

Dictionnaire technique

Chers bricoleurs et espérantistes,

Ça y est, le Petit Dictionnaire Technique de Grésillon est prêt. Vous pouvez l'imprimer et le diffuser. Voici ci-dessous l'adresse du fichier pdf :

gresillon.org/teknikavortaro ou
gresillon.org/IMG/pdf/TeknikaVortaretoDeGreziljono.pdf

Vous pouvez retrouver ce lien sur le site du château de Grésillon ou en cherchant "teknika vortareto de Greziljono".

Ce dictionnaire traduit 1809 mots.

Pour ceux qui le demanderont, j'imprimerai quelques exemplaires A5 en noir et blanc.

Bonne lecture et n'oubliez pas de faire des remarques.

Amike

Frédéric Lauriol

Membre du club d'Angers

et de la Commission technique de Grésillon.

lauriol.frederic@neuf.fr

06 88 56 77 01

10 rue Noël Pinot

49000 ANGERS

Congrès africain d'espéranto

Le Congrès Africain d'espéranto aura lieu du 29 décembre 2013 au 4 janvier 2014 à Cotonou (Bénin). Quatre congrès se sont déjà déroulés en Afrique, mais le dernier a eu lieu en 1995... Voici le temps du cinquième !

Mais, pour qu'il puisse se dérouler, les organisateurs ont besoin d'argent, essentiellement pour permettre aux espérantistes africains de venir à Cotonou...

Espéranto-France le collecte auprès de vous....

Votre contribution aidera à :

la venue d'au moins une personne de chacun des 17 pays africains ayant une association en relation avec l'UEA

l'organisation d'une réunion (physique) de la Commission Africaine de l'UEA

la rencontre d'espérantophones de différents pays d'Afrique et d'espérantophones venus du monde entier

En bref, au succès d'un véritable congrès africain !

Envoyez vos dons à : Espéranto-France 4 bis, rue de la Ceresaie 75004 Paris, en précisant : "pour le succès du congrès africain 2013". Un reçu de déduction fiscale vous sera adressé.